



Rezervu vian  
ekzempleron!

geinstruistoj@ileibr.org



“Jen praktika gvidilo por instruistoj kaj instruantoj kiuj (vole aŭ preskaŭ kontraŭvole) trovis sin antaŭ la devo instrui nian lingvon.”

Stefan MacGill

edukado.net

ilei



ilei

**Prezidanto:** Radojica Petroviĉ

**Vicprezidanto:** Stefan MacGill

**Sekretario:** Atilio Orellana Rojas

**Kasisto:** Sjoerd Bosga

**Estraranoj:** Aida Cizikaite,  
Mauro La Torre, Hokan Lundberg

ilei BR

**Prezidanto:** Antônio Felix da Silva

**Sekretario:** Joseo Tenorjo

**Komitatano:** Marcos Zlotovich

www.ileibr.org

geinstruistoj@ileibr.org

Rua Eng. Francisco Azevedo, 243  
05030-000 São Paulo, SP - Brazilo

Telfakso: 55 11 3873 8080

**Brazilei**

revuo@ileibr.org

**Ĉefredaktoro:** Joseo Tenorjo

**Grafikaranĝo:** Joseo Tenorjo

**Reviziantoj:** José Dias Pinto kaj

Paulo Sergio Viana

**kunlaboris en tiu ĉi numero:**


Radojica Petroviĉ, Antônio Felix  
da Silva, Osmar da Silva Alves

**Kuneldono:**

Eldonejo Korczak kaj ILEI-br



Editora Korczak



## Enhavo

Kara Instruist(in)o <b>Nova Komunikkanalo</b>	04
Parolo de spertulo <b>Radojica Petrović</b>	06
Parolo de la sekciestro <b>Antônio Felix da Silva</b>	14
Admirindaj Pensuloj <b>Johano Amoso Komenio</b>	16
Brazilei venigas Komenion en vian lernoĉambron...	22
Konkurso <b>Liro 2006</b>	25
<b>7 paŝoj por bone elturniĝi en la unua leciono</b>	28
Notinde	13
La Sekcio Interne	26

# Nova Komunikkanalo

**B***razilei* estas la tria kaj plej nova komunikkanalo de la Brazila Sekcio de ILEI. La nomo *Brazilei* estis proponita de tri membroj okaze de konkurso starigita en 2004 de la antaŭa sekciestro, Prof. Marcos Zlów, cele al elekto de nova nomo por la organo de la Sekcio. La premion (novan eldonon de PIV) gajnis Aristóphio Alves Filho, el urbo Macéio/AL, por kies kriterio validis la ordo de alveno de la konkursaĵoj.

Malsame al antaŭaj bultenoj de la Sekcio, *Brazilei* grafike naskiĝas kiel revuformato kaj celas enhave migri de informa al pli pedagogia eldonaĵo. Tia klopodo tamen postulos pli da kunlaboro de la redaktantoj kaj ankaŭ de geinstruistoj, la veraj travivantoj de lingvo-instruado.

La celo de la revuo estas, unuapaŝe, konkeri la simpation de la brazilaj geinstruistoj, por ke ili volonte malfermu sian lernonĉambron al ni; la dua paŝo permesos al ni ekkoni iliajn sukcesajn atingojn,

# Instruist(in)o

kiam temos pri spertintaj instruistoj, kaj iliajn malfacilaĵojn, kiam temos pri komencantaj instruantoj. Ambaŭ spertoj estas instruvaloraj kaj indaj je publikigo — ĉefe tiuj malsukcesaj, ĉar ne malofte ekkono pri niaj propraj maltrafoj estas multe pli instiga al trafo ol nura ekscio pri trafoj aliulaj.

*Brazilei*, kiel la nomo mem sugestas, estas revuo por la tuta enlanda instruistaro, **senpaga por la membroj de ILEI-br**, kaj aĉetebla de interesatoj ĉe la Sekcio mem per poŝto aŭ per interreto (bonvolu vidi la adresojn en la kolofono). La revuo aperos kvar fojojn jare kaj, danke al partnereco kun Eldonejo Korczak, ĝia senprofita vendoprezco espereble sukcesos atingi kiel eble plej multajn instruistojn.

Por la unua numero de la revuo ni kontaktis la prezidanton de ILEI, Prof. Radojica Pretoviĉ, loĝanta en Serbio. La intervjuo okazis per la interreto, kaj ĝuste pri tiu edukcela uzado de modernaj teknologioj reliefe komentis la intervjuito. Pri plej fora kontakto legeblas en la rubriko *Admirindaj Pensuloj*, fine de la artikolo, pri la fama pedagogo Komenio. Por tia kontakto tamen necesis nur iom da kreemo por regali la legantojn per fajnaj gutoj da saĝeco ĉerpitaj el la verkaro de la ĉeĥa pedagogo. ĝuindan legadon!


# Parolo de

# Radojica Petroviĉ

**L**a prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) invitas la legantojn de *Brazilei* iom pripensi la gravecon de instruado de lingvoj kaj la rolon de kursgvidantoj kiel perantoj de kulturaj valoroj. Antaŭ tia scenejo pli atentinda estas la respondecado de esperantistaj instruistoj kiel reprezentantoj de plurkultura diverseco travivita jam de pli ol jarcento de la tutmonda esperantista komunumo.

# spertulo

Serbia edukisto pri matematiko kaj informadiko kun magistriĝo pri aktuaria matematiko, naskita en 1949, nun estas asista universitata instruisto pri datumbazoj kaj komputika instrumetodiko. Okupiĝas pri esplorkampoj de informadiko, kvalitsistemo, komputika pedagogio, E-metodiko kaj interkultura edukado per Esperanto. Esperantisto ekde 1967, perfektigis siajn lingvosciojn kaj instrukapablon de Esperanto en seminarioj de Serbia kaj Kroatia Esperanto-Institutoj, seminario pri Zagreba metodo kaj Somera Esperanto-Lernejo en Slovakio. Verkis infan-gazetan E-kurson, beletrajn tradukojn el kaj al Esperanto, recenzojn kaj originalajn E-versaĵojn por infanoj. Gvidas lerneajn kaj eksterlerneajn E-kursojn kaj E-metodikajn seminariojn. Estis estrarano aŭ prezidanto de kelkaj naciaj kaj internaciaj E-organizaĵoj. Aplikigis la projekton Interkulturo en Serbio kaj kunordigas ĝian refunkciigon en nova eldono. Estas A-komitatano de UEA, membro de ILEI ekde 1991 kaj estrarano ekde 2001. Havas esperantistan familion: la filino aktivas en la movado, la filo parolas Esperanton kaj la edzino estas subtenanto.



**Brazilei:** Kiel kaj kial vi fariĝis instruisto?

**Radojica:** Mi unue fariĝis instruanto de Esperanto kiam mi aĝis 18 jarojn, en la kvara klaso de gimnazio. En la antaŭa jaro mi lernis kaj ekparolis la lingvon en sufiĉe ampleksa komenca kurso. Poste, ĉar Esperanto tiutempe (1967/68) estis sufiĉe populara en mia urbo, ni ne havis sufiĉajn kursgvidantojn kaj, do, mi transprenis unu grupon kaj gvidis mian unuan E-kurson. Fininte la gimnazion mi ekstudis matematikon ĉar tio estis por mi la plej facila kaj ŝatata studfako, kaj tio gvidis min al la posteno de gimnazia instruisto de matematiko. Sed mi havis ankaŭ aliajn instruistajn kaj neinstruistajn postenojn.

**“Instruista profesio sen la denaskosorta stampo (talento, amo kaj sindediĉo) estas duoble domaĝa”**

**Brazilei:** Kiom multe instruado de lingvo koncernas al komunikado?

**Radojica:** La esenca celo de lingvoinstruado estas kapablo de la lernantoj al komunikado kaj komunikiĝo per la lernata lingvo.

**Brazilei:** Kian instruiston oni atendu por la 21a jarcento?

**Radojica:** Didaktike lertan, fakte kompetentan, motivitan al kontinua pliperfektigado kaj kapablan akcepti lernantojn kun amo kiel kunlaborantojn, ne kiel pelatojn al lernado.

**Brazilei:** En kio koncernas la respondeco de geinstruistoj por konstruado de pli bona mondo?

**Radojica:** La instruisto havas taskon flegi la esperon, ke indas strebi al pli bona mondo kaj labori por ĝi malgraŭ la ĉiutagaj manifestiĝoj de la malbona mondo en la loka kaj



mondvasta vivmedioj de la lernantoj. Necesas flegi ĝin ne kiel utopian kredon, sed kiel sinceran kondutan kaj agadan orientiĝon. Malfacila tasko sed inda.

**Brazilei:** Ĉu ni baldaŭ travivos revolucion kaj drastan ŝanĝon koncerne al instruado de lingvoj, aŭ ĉu ni devos atendi ankoraŭ kelkajn jardekojn?

**Radojica:** La revolucio jam okazas aŭ okazis en kelkaj aspektoj: institucia, programa, metodologia, teĥnologia kaj ekonomia. Institucie, la lingvolernado disvastiĝis ekster ordinaraĵoj, kie ĝi estas nur unu el fakoj en la ŝarĝo de lernantoj. En specialaj lingvolernejoj kaj institutoj ĝi estas la sola fako. Tio ebligas maksimuman adaptadon de instrumentoj, ekipaĵo kaj grandeco de klasoj al specifaj postuloj de lingvodidaktiko.

**“La moderna lingvo-instruado per si mem ofertas al la lernanto plivastigon de la horizontoj”**

Metodologie kaj programe, la situaci-komunika kaj interkultura aliroj kaj lernanto-centra edukstilo inkludas adaptadon de la instruprocezo, instrumaterialoj kaj instrurimedo al la bezonoj, kapabloj kaj spertoj de la lernantoj, kaj rekonon de diversaj perspektivoj kaj komunikstiloj inkluzive de

empatio por fremdkulturaj vidpunktoj. La instruado, kiu ĉefe celis al komprenigo kaj alproprigo de lingvaj elementoj kaj strukturoj, evoluis al kultivado de lingvaj kaj interkulturaj komunikkapabloj. Tion reflektas la institucie preskribitaj lingvonormoj por lernado, instruado kaj taksado, ekzemple tiuj de la Konsilio de Eŭropo (Kumuna Referenckadro por Lingvoj) aŭ de Amerika Konsilio pri Instruado de Fremdaj Lingvoj (ACTFL), kiuj skuis la tradiciajn principojn kaj orientiĝon de lingvoinstruado.

Grandan evoluŝon al la lingvolernado kaj instruado donis la inform-komunikaj teĥnologioj. Ni spertas tion ankaŭ en Esperantujo, ekzemple tra la projektoj NESTO kaj lernu.net.

Kaj, ne laste, la instruado de lingvoj fariĝis nova industrio kun grandaj financaj rezultoj. Por ekzemplo, ni menciuj nur la anglan lingvon kiel grandprofitan eksportvaron de British Council.

**Brazilei:** Kion oni povas oferi al lernanto deziranta akiri ion pli ol la bazan lertecon komunikiĝi per alia lingvo krom la gepatra?

**Radojica:** La moderna lingvoinstruado per si mem ofertas al la lernanto plivastigon de la horizontoj, rekonon kaj komprenon de aliaj mondkonceptoj kaj vivstiloj, kaj kapablon orientiĝi kaj elturniĝi en la cirkonstancoj de kultura diverseco.

**Brazilei:** Kiom multe lernado de fremda lingvo interagas kun la gepatra lingvo de la koncernato?

**Radojica:** Tio ne estas mia esplorkampo, sed mi povas paroli pri miaj propraj spertoj. Mi ĉiam komparadis la relative simplajn kaj plejparte senesceptajn regulojn de Esperanto kun la komplikaj kaj esceptoplenaj gramatikaĵoj de la serba lingvo. Tio ebligis al mi ĝeneraligi iujn gramatikajn konceptojn kaj principojn, kaj kompreni, ke iuj el ili ne nepre validas por aliaj lingvoj. Tiel mi grandparte liberiĝis de la pensmatricaj katenoj de la denaska lingvo kaj pli facile lernis fremdajn lingvojn.

**Brazilei:** Laŭ kiu aspekto Esperanto povas kontribui al nova koncepto pri instruado de lingvoj?

**Radojica:** Eble la ĉefa tasko de Esperanto-instruado en tiu kunteksto estas plia konsciigo pri la lingva kaj kultura diverseco kaj lingvaj kaj kulturaj rajtoj, kaj pri la bezono kaj ebleco trovi justajn solvojn por komunikado en la diverseco. Atentindaj estas ankaŭ la lernfaciliga efiko de Esperanto kaj flegado de ĝiaj imanentaj etikaj valoroj.

**Brazilei:** Perkomputila instruado kaj lingva interkultura edukado estas okupoj tre ŝatataj de vi. Bonvolu iom paroli pri ili.

**Radojica:** Mi prefere metas lernadon en la centron de atento. La instruadon mi vidas kiel instigon kaj subtenon al la lernado. Tiel mi instruas miajn studentoj pri komputika metodiko.

Unuflanke, la perkomputila lernado estas beno de la moderna instruteĥnologio. Ĝi ofertas elekteblan riĉecon de studmaterialo kaj ĝian prezenton en diversaj formoj por stimuli diversajn perceptokanalojn de la lernanto kaj plimotivigi la lernadon. Aliflanke ĝi portas riskon de malsociigo de la lernantoj. La lernantoj lertiĝas interkomuniki kun la maŝino anstataŭ lerni interkomunikiĝon kun la homoj. Tio plifortigas la respondecon de kreantoj de elektronikaj kursoj kaj de instruistoj kiuj ilin utiligas.

La interkultura lernado signifas ne nur komunikiĝon kun kulturoj de aliaj popoloj kaj aliaj mondopartoj, sed ankaŭ konsciiĝon pri la kultura diverseco en la plej proksima medio, en la klasĉambro, en la familio kaj en si mem. Ekzemple, la diversaj perspektivoj de la instruisto kaj la lernanto implicas imanentan interkulturan komunikadon en la

(Daŭrigota sur la sekva paĝo)

edukprocezo sendepende de etna diverseco aŭ sameco en la klaso. Tio pligravigas la taskon de instruisto mem lerni kaj atenti la interkulturan diversecon, kaj kreskigi sian empatian.

**Brazilei:** Laŭ via opinio, ĉu instruado estas profesio aŭ denaskosorto?

**Radojica:** Instruista profesio sen la denaskosorta stampo (talento, amo kaj sindediĉo) estas duoble domaĝa — por tia instruisto kaj por ties instruatoj.

**Brazilei:** Laste, ĉu iu mesaĝo por la brazilaj geinstruistoj?

**Radojica:** Mi tre ĝojus aŭdi, ke instruistoj de ILEI-br kaj de BEL laboras kune. ILEI internacia kaj mi persone estas ĉiam je dispono por kunlaboro kun ambaŭ. Mi deziras al ĉiuj brazilaj instruistoj ĉiam novajn sukcesojn kaj plezurojn en plenumado de la nobla instruista laboro.

## Diferenco inter eduki kaj instrui

En iu lernejo neordinara situacio komencis okazi: ĉiutage grupeto de knabinoj, post ŝmiri sin per lipofarbo, liberiĝis el la eksceso per kiso sur la neceseja spegulo. La purigistino sin direktis al la direktoro kun plendo, ke estas al ŝi laborige ĉiutage purigi la spegulon. Sed kiel ĉiam je la venonta tago jen la samaj farbomarkoj sur la spegulo.

Iun tagon la direktoro venigis la knabinojn kaj la purigistinon en la necesejon, kaj pacience klarigis al ili pri la laboriga tasko ĉiutage forigi tiajn markojn de sur la spegulo. Post preskaŭ duonhoru da parolado, dum kiu la knabinoj diboĉmienis, la direktoro petis, ke la purigistino montru al la diboĉulinoj kiel malfacila estas la laboro.

La purigistino tuj prenis drapon, malsekigis ĝin en la neceseja vazo kaj frotis ĝin sur la spegulo.

Neniam plu aperis markoj de lipofarbo sur la spegulo.

### TV elsendas gutojn da Esperanto

La konata TV-kurso de Prof. Sylla Chaves “Gotas de Esperanto” (Gutoj da Esperanto) por portugaliaj parolantoj estas denove elsendata al 30 urboj tra la lando pere de União Planetária (Unio Planeda). La elsendado komenciĝis en decembro 2005 kaj daŭris ĝis junio pasinta. Ĉiu guto da gramatiko daŭras kvin minutojn kaj ĝi aperis almenaŭ kvarfoje en ĉiu unuhora programero elsendita de Unio Planeda kaj ties TV-partneroj. La aŭtoro alvokas la esperantistojn iel apogi tiun iniciaton, kontaktante la elsendanton, kun instigo al plua elsendado de sia kursomaterialo. [www.uniaoplanetaria.com.br](http://www.uniaoplanetaria.com.br)

### Projekto KATEDRO

Ĉu vi havas specialan manieron gvidi lecionojn kaj disponas je rimedoj filme registri ilin? La organizantoj de la projekto serĉas surbendigitajn kursojn aŭ kurserojn, en kiuj spertaj instruistoj gvidas lecionon laŭ speciala kaj sukcesa metodo aŭ prezentas interesan ekzercon. Ankaŭ por farotaj surbendigoj povas okazi interkonsento inter la projekto-teamo kaj la interesatoj. Se vi havas materialon taŭgan por la celoj de la projekto, kontaktu la projektogvidantinon, Katalin Kovats, rekte ĉe la adreso <katalin@ikso.net>.

### THORSEN-Apogo je dispono de Bibliotekoj

Esperanto-bibliotekoj havas denove ŝancon akiri senkoste librojn, kiuj mankas en iliaj kolektoj, ĝar jam por la deka fojo UEA disdonos subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Por subvencio rajtas kandidatiĝi bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. Interesataj bibliotekoj sendu priskribon pri si kaj liston de dezirataj libroj laŭ ordo de prefero. Petoj pri diskoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estas konsiderataj. La subvencio oni ricevos kiel librojn surbaze de la listo, kiu akompanis la peton. En la jaro 2005 sep bibliotekoj ricevis subvenciojn, kiuj valoris 80 ĝis 225 eŭrojn. La petoj devas atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 2006. Krom paperpoŝte (UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando), eblas sendi ilin ankaŭ rete al <direktoro@co.uea.org>.

# Parolo de

## La Granda Defio: Instrui Esperanton

**L**o ŝanĝiĝis en mia vivo, kiam mi legis la vorton Esperanto en ĵurnalo. Poste mi konis Esperantistojn kiuj laboras kaj vivas por disvastigi la lingvon internacian Esperanto.

Mia unua instruistino, s-ino ELVIRA FONTES, vivas tiel kaj ŝi montris al mi, ke Esperanto estas nova lumo kiu brilas en la mondo. En ĉi tiu mondo kie homoj ankoraŭ militas kaj malamas unuj la aliajn.

Ĉiuj homoj klopodas vivi pace. La lingvo Esperanto estas grava ilo por atingi tiun celon. La neŭtrala ideologio de Esperanto montras al ni, ke ĝi taŭgas kiel vojo por ke la homoj povu facile kaj libere komunikiĝi unuj kun aliaj kaj tiamaniere ĝui egalajn rajtojn kun efika partopreno en decidoj pri lingvo mem kaj la vivo. Nur tiel la homoj vivos pace.

# la sekciestro



La perforto ĉeestas en la mondo sed la interna ideo de Esperanto invitas nin vivi kaj vivigi la amon. Ni estas Esperantistoj, pro tio ni havas la verdan stelon kiu memorigas al ni, ke Esperanto estas frateco kaj amikeco.

La Esperantistoj laboras por montri al la mondo ke nia lingvo kunligas la homojn por vivi plibone. Sed kie lerni Esperanton?

Kiu loĝas en malgrandaj urboj ne aŭdas paroli pri Esperanto. Eĉ kiu loĝas en grandaj urboj apenaŭ scias pri Esperanto, ĉar nur de tempo al tempo iuj aŭ aliaj Esperantistoj invitas la homojn lerni Esperanton.

Kiuj estas tiuj Esperantistoj? Preskaŭ ĉiam ili estas idealistoj kiuj scias, ke Esperanto estas la dua lingvo por la homaro. Ili laboras por la lingvo tute solaj, sed iel ili disvastigas ĝin.

Pro tio estas necese helpi ilin per bonaj instruiloj, libroj kaj revuoj malmultekostaj kaj perfektigi ilian scipovon pri Esperanto.

Mi opinias, ke se ni deziras, ke la lingvo internacia Esperanto vere estos la dua lingvo por ĉiu homo, ni bezonas helpi tiujn, kiuj instruas Esperanton sen ia ajn apogo. Tio estas nia granda defio.

# Admirindaj

## Johano Amoso **Komenio**

Márcio Ferrari

### LA INICIATINTO DE MODERNA DIDAKTIKO

La ĉeĥa filozofo defiis la mezepokan sistemon, defendis la instruadon de "ĉio por ĉiuj" kaj estis la unua teoriisto respekti la inteligenton kaj la sentojn de infano.

Traduko: Osmar da Silva Alves - revuo Nova Escola, marto 2004





granda, kiel la mondo tiam malkovrata per la ekspansio de komercado kaj navigado.”

En la libro la edukisto proponas rezonadon de ĉiaj edukaj agoj, komence de la didaktika teorio ĝis la ĉiutagaj demandoj en klasĉambro. Laŭ li, la lerneja praktiko devas imiti la naturprocezojn. En la rilatoj inter edukisto kaj lernanto, estas konsiderataj la eblecoj kaj interesoj de la infano. La edukisto estas rigardata kiel profesiulo, ne kiel misiisto, kaj estas bone salajrata por tio. Koncerne al planado de tempo kaj instruilaro, oni konsideru la kopolimojn kaj la neceson — kaj de la lernantoj kaj de la instruistoj — plenumi aliajn aktivadojn.

## Rompo kun la skolastiko

Komenio estis protestanta kristano, membro de la religia grupo Bohemaj Fratoj, al kiu li tenis sin ligita dum sia tuta vivo, fariĝante episkopo de la moravoj en 1648. Kvankam profunde religiema, la edukisto proponis radikalman rompon kun la lernejo-modelo ĝis tiam praktikata de la Katolika Eklezio, tiu direktata nur

**Johano Amoso Komenio** naskiĝis en 1592 en urbo Nivnico, Moravio (tiam sub la regado de la Habsburgoj, nuntempa Ĉeĥio). Komenio estis la ununura filo de paro da anoj de la protestanta grupo Bohemaj Fratoj. En Universitato de Hajdelbergo (Germanio), entuziasmiĝis pri la ideoj de pensuloj kreintaj koncepton pri scienco bazita sur empirismo. Li plenumis religian karieron kaj devis fuĝi al Pollando kiam, en la komenco de 30-jara Milito, en 1618, la reĝo Ferdinando la Dua decidis revenigi katolikismon al Bohemio. Lia indigno antaŭ tia situacio igis lin verki pri filozofio kaj pedagogio mokante pri la tiama ordo kaj proponante radikalajn ŝanĝojn. Tiuj ideoj allogis pensulojn el Anglio, kiuj invitis lin labori en

al la elito kaj esence dediĉata al abstrataj studoj. Ankoraŭ regis la skolastikaj doktrinoj el mezepoko, laŭ kiuj ĉiuj teoriaj demandoj submetiĝas al la kristana teologio.

Komenio, krom estis la edukisto kiu siaepoke defiis la beletristikan pedantecon kaj la pedagogian sadismon, ankaŭ aŭdacis esti la ĉefa teoriisto pri lernejo-modelo kiu devas instrui “ĉion al ĉiuj”, inkluzive al menshandikapuloj kaj knabinoj, tiuepoke senigitaj je instruiteco. “Li defendis la senesceptan aliron al skribadoj, legado kaj kalkulado, por ke ĉiuj legu la Bibliion kaj ekzerciĝu en komercado”, diras Gasparin. Komenio tiamaniere respondis al du nepraĵoj de sia epoko: la apero de komerca burĝaro en eŭropaj urboj kaj la rajto, por kiu pledis la protestantoj, al la libera interpretado de religiaj tekstoj, malpermesata de la tiama katolika eklezio.

La verko de Komenio koncernas ankaŭ al aliaj aktivecoj, inter kiuj “la vekigo al nova koncepto pri infano”, kiel diras Gasparin. “Li pritraktas la infanon en siaj libroj tre milde, en epoko

(Daŭrigota sur la sekva paĝo)

la lando, sed la projekto estis interrompita pro la ekapero de la Angla Civila Milito, en 1642. Provoj pri lernejskemoj proponitaj de la sveda kaj hungara registaroj fiaskis — parte pro insistado de la edukisto disvastigi sian “pansofion”, sensukcese — kaj li revenis al Pollando. Komenio denove devis fuĝi de civila milito kaj ekloĝis en Amsterdamo, kie li restis ĝis sia morto, en 1670. Tiuepoke liaj libroj tekste ilustritaj por lernado de lingvoj kaj sciencoj tre furoris en eŭropaj lernejoj.



kiam la lernejo funkciis per manfrapila edukado”, daŭrigas la profesoro. “La edukado estis rigardata kaj praktikata kiel puno kaj ne disponigis elementojn por ke poste la homoj lokiĝu pli amplekse en la socio. Komenio kontraŭreagis al tiu scenejo per demando: kial oni ne lernas amuze?”

## Por Prinpensi

La plej granda kontribuo de Komenio por la nuna edukado estas, laŭ profesoro Gasparin, la ideo “porti la socian realaĵon en la klasĉambron, uzante la plej modernajn teknologiajn rimedojn tiam disponeblajn”. Tiel mirigita estis Komenio pri la invento de presarto kaj la ebleco pri kono-disdonigo, kiun ĝi reprezentis, ke li kreis la esprimon ‘didakografio’ por signi la universalan instrumentodon, kiun li intencis inaŭguri. Ĉu la nuntempa teknologio pri informado kapablas realigi tian revolucion? Kiu estas via opinio?

## Serĉe de la Universala Harmonio

Komenio vivis la plej grandan parton de sia vivo ĉirkaŭata de militoj. Kelkaj el ili, kiel la 30-jara Milito fare de protestantoj kontraŭ katolikoj, rekte rilatis al li. Lia tuta verkaro estis profunde markita de tio, ĉar la celpunkto de lia penso estis la universala kompreno, kiu unuigos la tutan homaron. Li serĉis ekde sia juneco la unuigon de la tutaĵo de la homa kono, ĉar li kredis, ke ĝi estas limigita kaj neŝanĝebla. La konstruo de scioenciklopedio kaj ĝia adaptiĝo al la infanaj kapabloj estas la granda temo de la pedagogio de Komenio, kaj por teni ĝin li kreis filozofian bazon nomatan “pansofio”, nome la serĉo de baza principo harmoniiganta la tutan sciaron. Kontraŭe al lia instruiga penso, kiu vekis intereson tra Eŭropo, la pansofio ne havis sekvantojn.

## Savo de Animo

Sub influo de siaj religiaj konceptoj kaj de la filozofo Francisko Bakono (1561-1626), Komenio kredis, ke la savo de la animo estas atingita dum la surtera vivo mem kaj por tio ĝi povas kalkuli je la scienco. Laŭ li, la homa estulo respondas al la idealo pri perfekteco. Komenio kredis, ke, ĉar la homo estas dotita per racio, li povas kompreni sin mem kaj ĉiujn aferojn. Tial li devas sin dediĉi al lernado kaj instruado. Laŭ tiu penso, Komenio konkludas, ke la plej grava afero en la vivo ne estas la kontemplado, sed la ago, la “farado”.

Laŭ la humanisma penso de la ĉeĥa pedagogo, la instruo kaj la laboro diferencigas la burĝan disde la feŭda homo. Dum sia vivojo la nova individuo devas imiti la naturon, ĉar sekvante Dion, kaj respektante la kapablojn de ĉiuj, ne estas ebleco erari. El Bakono, Komenio adoptis la empirian metodon esplori la mondon, kontraŭe al la altruditaj veroj de mezepoka instruado. Per eksperimentado li kredis, ke ĉiuj povas vidi la harmonion de la universo sub la ŝajna ĥaoso. “Komenio volus ŝanĝi la lernejon per didaktiko kaj la socion per edukado”, diras Gasparin. “Li estis admirinda idealisto.”

“Oni devas komenci la instruitecon tre frue, ĉar oni ne devas pasigi la vivon lernante, sed agante.”

“Malsaĝe agas tiu, kiu intencas instrui al lernantoj ne kiome ili povas lerni, sed kiome li mem deziras.”



## Brazilei venigas Komenion en vian lernoĉambron... Ĝuu la viziton kaj profitu el lia saĝo!

### Pri principoj de instruado

**Brazilei:** Kiu estas la plej taŭga momento por eklerni lingvon?

**Komenio:** La naturo respektas konvenan tempon. La ekzerciĝado de la homo devas komenciĝi en la printempo de la vivo, nome en la infanaĝo.

**Brazilei:** Kiel sin preparu kursgvidantoj?

**Komenio:** La naturo preparas la materialon antaŭ ol ĝin formi. Necesas unue pretigi lernolibrojn kaj ĉiujn ceterajn instruilojn. Neniu lingvo estu instruata laŭ gramatiko, sed laŭ konvenaj verkistoj. Unue instruu pri objektoj kaj poste pri manipulado de ili. Unue prezentu ekzemplojn kaj nur poste regulojn.

**Brazilei:** Nura gvidado de la lecioneroj sufiĉas por sukcesigi lingvo-kurson?

**Komenio:** La naturo prenas por sia laboro taŭgan objekton, aŭ almenaŭ taŭge ĝin adaptas. La instruisto devas unue prepari la menson de la lernantoj, nome vekti ilian intereson kaj emon al lernado kaj sciado.



**Brazilei:** Kiel prezenti la lernotan materialon?

**Komenio:** La naturo komencas ĉiun sian kreadon de la plej larĝa tutaĵo kaj finas per la plej etaj detaloj. Ĉiu lingvo, scio aŭ lerteco estu unue prezentita per tute simplaj fundamentoj, por ke estu komprenata la totala bildo, due pli komplete per reguloj kaj ekzemploj, trie per kompletaj sistemoj kun aldonitaj malregulaĵoj, fine per komentarioj, se ili estas necesaj.

**Brazilei:** Kiajn legaĵojn la instruantoj rekomendu al la kursanoj?

**Komenio:** La naturo zorgas kontraŭojn kaj malutilaĵojn. Ne donu al la lernantoj librojn krom tiuj, kiuj estas destinitaj por ili. La libroj estu tiel aranĝitaj, ke ili prave estu nomataj fontoj de saĝeco kaj moraleco.

## **Pri metodo de lingvoj**

**Brazilei:** Kion diri pri homoj kiuj eklernas lingvon nur por kleriĝo?

**Komenio:** La lingvojn ni lernas ne kiel parton de klareco aŭ saĝeco, sed kiel instrumenton, per kiu eblas klarecon ĉerpi kaj komuniki al aliaj. Tial ni devas lerni ne ĉiujn lingvojn, kio ne eblas, nek multajn, kio estus senutila, ĉar tio forprenas tempon por studado de aferoj, sed sole la bezonatajn.

**Brazilei:** Ĉu eblas regi lingvon nur per lernado de ĝiaj reguloj?

**Komenio:** La lingva studado devas iri paralele kun la studado de objektoj. El tio rezultas, ke ni ne lernu vortojn aparte, ĉar ankaŭ la objektoj ne ekzistas nek estas kompreneblaj izole, sed nur en sia interrilato. Due el tio rezultas, ke por neniu estas necese koni la tutan lingvon kaj estus ridinde kaj naive, se iu provus tion. Sole la lingvon gepatran oni bezonas lerni preskaŭ perfekte

**Brazilei:** Kion diri pri instruantoj kiu multe insistas pri instruado de gramatiko?

**Komenio:** Ĉiun lingvon oni devas lerni pli per praktikaj ekzercoj ol reguloj. Sed la praktika uzado devas esti subtenata kaj firmigata per reguloj. La lingvaj reguloj devas esti gramatikaj, ne filozofiaj. Ni ne devas esplori la esencon kaj originon de vortoj, frazoj kaj kunmetaĵoj, kial ili estas tiaj aŭ aliaj, sed per simpla maniero klarigi, kio kaj kiel okazas. Estus ne nur senutile, sed rekte malutile ripeti aferojn komunajn (ekzemple difini, kio estas substantivo kaj kio verbo).





# Liro 2006

*La Ondo de Esperanto* denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro*.



***Liro-2006* havas kvin branĉojn.**

**1. Originala prozo, 2. Originala poezio, 3. Traduka poezio:** porinfanaj poemoj de Agnija Barto, okaze de ŝia 100-jara jubileo.  
**4. Traduka prozo (el la rusa lingvo):** *Medvedj na vojevodstve* de Miĥail Saltykov-Ŝĉedrin. **5. Traduka prozo (el la angla lingvo):** *A diagnosis of death* de Ambrose Bierce.

En la branĉoj 1–3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la organizantojn antaŭ 15 okt 2006. Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso. Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso sezonoj@yahoo.com. Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj estas elŝuteblaj ĉe <http://esperanto.org/Ondo/Liro2006.htm#Diagnoz>. La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2006. La organizanto ĝis 1 jan 2009 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

### Unuaj atingoj en 2006



70 geinstruistoj kaj simpatiantoj de Esperanto, el 25 urboj kaj 7 ŝtatoj, (re)membraĝis al la Brazila Sekcio de ILEI por 2006. **La kampanjo** komenciĝis en novembro pasinta kadre de dutaga E-aranĝo okazinta en urbo Araras/SP kaj daŭras en la retejo de ILEI-br. Por tiuj kiuj daŭre fidis al nia laboro kaj pacience atendis, jen niaj unuaj klopodoj por revigligi la instrufakon pri Esperanto nialande.

1- Post kelkaj monatoj da restrukturiĝo, la hejmpaĝo de la Sekcio estas relanĉita kun pluraj informoj kaj ĉe nova propra adreso: [www.ileibr.org](http://www.ileibr.org) .

2- Ekde nun la membroj de ILEI-br povas interŝanĝi spertojn en la kunvenejo starigita speciale por tio en la portalo Yahoo-grupoj ĉe la adreso < [http://br.groups.yahoo.com/group/ilei\\_brazilo](http://br.groups.yahoo.com/group/ilei_brazilo) > .

3- Krom la du supre menciitaj komunik-kanaloj, mankis ankoraŭ al la Sekcio speciala



kanalo kun pli da alirebleco, nome papera eldonaĵo. Danke al partnereco kun Eldonejo Korczak, jen aperas la unua numero de la trimonata revuo *Brazilei*. Ĝi estas senpage dissendata al la membroj.

4- Cele provizi la brazilan instruistaron per nemalhaveblaj instrumaterialoj, la Brazila ILEI-Sekcio importis ekzemplerojn de la furora Manlibro pri instruado de Esperanto redaktita de Katalin Kováts. Antaŭmendoj de la verko jam eblas plenumi ĉe la retejo mem de la Sekcio aŭ per poŝto rekte al nia oficejo (vidu adreson en la kolofono).



Metodika libro por progresantoj de la internacia lingvo Esperanto

Redaktis:  
Katalin Kováts  
Eldonejo:  
Espero/ILEI

5- Kiel konstateblas, la Sekcio klopodas esti iun bazon, masoni vojojn por ke la geinstruistoj kunuzu ilin por plenumado de instrubezonoj. Projektoj nepras, sed sen minimuma strukturo (ekzemple mon- kaj homrimedoj) estas malfacile plenumi ion ajn. Tial via reago estas ege bonvena per unu el la tri funkciantaj kanaloj:

#### **Revuo Brazilei**

revuo@ileibr.org  
Rua Eng. Francisco Azevedo, 243  
05030-000 São Paulo, SP  
Tel. (11) 3873-8080 / 6155-7978

#### **Hejmpaĝo:**

www.ileibr.org  
geinstruistoj@ileibr.org

#### **Virtuala kunvenejo:**

[http://br.groups.yahoo.com/group/ilei\\_brazilo](http://br.groups.yahoo.com/group/ilei_brazilo)

# 7

## Paŝoj por bone elturniĝi en la unua leciono

Post interkonsento pri loko, tago kaj horo por gvidi la lecionojn, nun estas via vico ludi la ĉefan rolon kiel kursogvidanto. La unua leciono estas decidiga por restigi kiel eble plej multajn interesatojn pri la lernota lingvo. Kontrolu mem ĉu iu el la sekvaj paŝoj aldonindas al via propra kolekto da sugestoj.

### 1

#### AKCEPTADO

La loko kie okazos la lecionoj devas esti aranĝita tiamaniere ke la vizitantoj sentu sin bone atendataj kaj akceptataj. Laŭ eble afiŝu en pluraj lokoj de la kursejo informmaterialon pri la lingvo kaj pri la kurso. Tia aranĝo okupigas la vizitantojn kaj nerekte preparas ilin al la esperanta medio. La aranĝo estas pli efika se disponebla kiel ekspozicio.

### 2

#### PREZENTADO

Se vi ne havas sperton prelegi, evitu longan paroladon pri la atingoj kaj historio de Esperanto en la unua leciono. Se temas pri nura lingva kurso, pli taŭge estas pogute injekti tiajn informojn laŭlonge de la kurso mem. Multaj lernantoj estas altirataj de la lingvo pro nura scivolo, dum aliaj pro emo al lernado. Pli oportune estas prezenti tian materialon, kelke da tempo antaŭe, kiel inviton al la kurso.



### 3

#### KLARIGADO

Prezentu resuman priskribon pri la kurso. Klarigu ĝian celon kaj el kio ĝi konsistas: ĉu estos lernotaskoj? Taksezameno? Ĉu temas pri laŭŝtupa kurso aŭ pri nura enkonduka kurso? Sciante kio kaj kiel okazos, la lernantoj mense sin preparos por akompani kaj profiti la lecionojn.

### 4

#### KUNLUDADO

Depende de la loko kaj cirkunstancoj, multaj lernantoj sentas sin iom streĉaj en la unua kontakto kun la esperanta medio. Por ke ili sentu sin hejmece, preparu kunludadon iel koncernantan al komunikado kaj partoprenigu ĉiujn. Fine de la ludado ilia humoro estos pli malferma por akcepti la unuajn novaĵojn pri la lernota lingvo.

### 5

#### ELEKTADO

Kiel eble evitu gvidi lecionojn per fotokopiaĵoj, anstataŭ per originalaj libroj. Tia praktiko donas la impreson ke la esperanta parolantaro, malgraŭ sia 119 jariĝo, estas tiel amatora kaj senzorga, ke simplan didaktikan libron ĝi ne kapablas produkti. Kaj tamen ekzistas multaj tiaj lermiloj! Cetere, la unuan libron oni neniam forgesas... Se temas pri tute nepagpovaj klasanoj, prikonsideru kelkajn eblecojn havigi tiujn lernilojn senpage al ili.

Homoj tre ŝatas ricevi donacetojn. Pretigu informilojn pri Esperanto kun adresoj de plej gravaj lokaj, enlandaj kaj eksterlandaj organizaĵoj kiuj uzas aŭ diskonigas la lingvon, por donaci al la vizitantoj. Tiel la lernantoj tuj peceptos, ke vi ne laboras izole, ke ĉirkaŭ la ideo Esperanto interagas multaj homgrupoj laŭ plej diversaj kulturagadoj. Se vi mem ne lertas pri farado de tia materialo, petu helpon de amiko. Kontaktu eldonejojn kaj E-asociojn. Ordinare ili havas iun propagando-materialon pri Esperanto aŭ en Esperanto kaj tre volonte disdonos ilin al interesatoj.

Se via klaso ensence konsistas el plenkreskaj homoj, evitu unuopan literumadon de la alfabeto. Plej ofte tio igas ilin senti sin kiel infanoj. Pli oportune estas sekvi normale la lecionojn kun korekto kaj klarigo pri la novaj fonemoj kiam ili aperos en fraz(er)oj. Ankaŭ ne donu tre multe da detalaj klarigoj pri la apartaĵoj de la fonemoj. Simpligu la laboron disdonante prononctabelon, kiel ĉi suban ekzemple, kiu estas preskaŭ memkomprenebla kaj tre oportuna por konsulto fare de la gelernantoj dum legado.



Tabelo de fonetika transkribo de la esperanta alfabeto

	<b>B</b>	<b>C</b>	<b>Ĉ</b>	<b>D</b>	<b>F</b>	<b>G</b>	<b>Ĝ</b>	<b>H</b>	<b>Ĥ</b>	<b>J</b>	<b>Ĵ</b>	<b>K</b>	<b>L</b>	<b>M</b>	<b>N</b>	<b>P</b>	<b>R</b>	<b>S</b>	<b>Ŝ</b>	<b>T</b>	<b>Ŭ</b>	<b>V</b>	<b>Z</b>
<b>A</b>	bá	tsá	tchá	dá	fá	gá	djá	há	hhá	já	ká	lá	má	ná	pá	rá	sá	chá	tá	uá	vá	zá	
<b>E</b>	bê	tsê	tchê	dê	fê	guê	djê	hê	hhê	iê	jê	kê	lê	mê	nê	pê	rê	sê	chê	tê	uê	vê	zê
<b>I</b>	bi	tsi	tchi	di	fi	gui	dji	hi	hhi	ii	ji	ki	li	mi	ni	pi	ri	si	chi	ti	uí	vi	zi
<b>O</b>	bó	tsó	tchó	dó	fó	gó	djó	hó	hhó	ió	jó	kó	ló	mó	nó	pó	ró	só	chó	tó	uó	vó	zó
<b>U</b>	bu	tsu	tchu	du	fu	gu	dju	hu	hhu	iú	ju	ku	lu	mu	nu	pu	ru	su	chu	tu	uú	vu	zu

# Monda Mozaiko



## E-lernejoj



## Poŝamiko

EDUKADO.NET

Paŝtu viajn gelernantojn tie ĉi



# Brazila Sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj revigliĝas tagon post tago. Revigliĝu ankaŭ vi!

Aliĝu tuj!  
Geinstruistoj.ileibr.org

Oficeja adreso

Rua Eng. Francisco Azevedo, 243  
05030-000 São Paulo, SP - Brazilo  
Telefakso: 55 11 3873 8080



[www.ileibr.org.br](http://www.ileibr.org.br)

[http://br.groups.yahoo.com/group/ilei\\_brazilo](http://br.groups.yahoo.com/group/ilei_brazilo)